# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 56, Numero 03, Septembro 2020*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Jarkunvo la 13an de septembro 2020


*Nicole Else, Sekretario de EFNSK*

Unuafoje la jarkunveno okazis virtuale per Zoom. Tio bone funkciis. Dum la jarkunveno nova estraro estis elektita.
La nuna estraro do estas:
Prezidanto: Andrew Spannenberg
Vicprezidanto: Dmitry Lushnikov
Sekretario: Nicole Else
Kasisto: Jonathan Cooper
Junularaj aferoj: Adam Levy
Estrarano: Alan Turvey

## Homa komunikado: ĉeestante kaj virtuale

*Jonathan Cooper, kasisto de Esperanto NSW kaj vicprezidanto de AEA*

Dum la televidprogramo Q&A la 14an de septembro (ABCTV), socia esploristo kaj aŭtoro Hugh Mackay asertis, ke komuniki per vidbabililo (ekzemple, Skype aŭ Zoom) estas tute malsame ol esti kune en la sama loko kaj babili. La kialo, laŭ li, estas la manko de fizika ĉeesto kaj la neeblo de tuŝo (eĉ se tio fakte ne okazas). Kvankam tiuj estas gravaj kaj signifaj, mi kredas, ke la reala malsameco situas aliloke.



Mi kaj mia edzino havas du filinojn kaj nepinon, kiuj loĝas en Kanado, kaj kiuj tre mankas al ni (speciale nun pro la pandemio KOVIM19, kiu malebligas nin vojaĝi). Ni estas tre dankemaj pri la eblo babili per Skype, FaceTime kaj Facebook Messenger, sed la sperto ne estas sama kiel kiam ni vizitas ilin aŭ ili vizitas nin. Kial? Mi suspektas, ke estas ĉar oni ĉiam devas organizi tempon por komuniki virtuale. Kiam estas konvene por ni ofte ne estas konvene por ili, kaj reciproke. Krome, kiam ni finfine trovas konvenan tempon por ambaŭ flankoj, ni devas sidi antaŭ niaj aparatoj dum la konversacio.

Ankaŭ estas sento, ke ni devus ne malŝpari la oportunon, do sesioj ofte daŭras pli ol horon kaj ni kredas, ke ni ĉiam devas havi ion por diri. Tio eble estas parte la kialo, ke trovi konvenan tempon estas tiel malfacile.
Aliflanke, kiam ni estas kune en la sama loko, ni iom hazarde trovas tempojn por babili—dum oni preparas manĝon, dum ni piediras al la butiko, dum ni spektas la nepinon ludi ĉe la parko, ktp. Ne tre gravas, se ni estos interrompitaj;ni kutime povos daŭrigi iom poste.
Tio havas efikon al virtualaj kunvenoj kaj kongresoj. Oni povas okazigi prelegojn, lecionojn kaj eĉ laborsesiojn per Zoom, sed la koro de kongreso verŝajne estas la hazardaj interagoj inter homoj, speciale inter tiuj de malsamaj lingvaj kaj kulturaj devenoj. Ĝis ni povos iel repliki tiun sperton per interreta teknologio, ni certe ankoraŭ bezonas ĉeestajn kunvenojn.
Mi apenaŭ povas atendi!

## "Kviraj" Vortoj

*Maria COLUBRIALE, membro de EFNSK*

Ekzistas multaj esperantaj vortoj pri la temo de "kvireco". Tiu estas komplika temo, multaj vortoj estas el la angla, sed la signifo ofte ne samas. Ni esploru kelkajn strangajn «kvirajn» vortojn kune sube:

**Neŭtreco kaj Neŭtraleco**

La vorto «neŭtrala» estas pri favorado (unu supre la alia).[1] Ni parolas pri neŭtreco, kiu estas pri sekso, (ne apartenas la duumon, nek ina nek iĉa, ekz neŭtraj pronomoj «ĝi» aŭ «ri»).[2]

**Elŝrankiĝo**

Elŝrankiĝo laŭvorte «eliri el la ŝranko», kiu estas metaforo el la angla por mempublikigado principe pri kviraj aferoj.[3]

**GLAT**

Eble vi aŭdis la akronimon «GLAT» (Gejoj Lesbanoj Ambaŭseksemuloj kaj Transuloj). Honeste ĉi tiu akronimo ne taŭgas. GLAT estas anglismo (el "LGBT") kaj teknike ne inkluzivas senseksemulojn, interseksulojn, demandadulojn, ktp. «Kviro» estas ĝenerala vorto kaj estas pli ampleksa ol GLAT. Tial oni ofte aŭdis pri pli longaj anglaj akronimoj "LGBTIQ+".

**Kviro**

La vorto «kviro» signifas iun, kiu ne konformas al la seksaj normoj.[4] Laŭ mi, esperante la vorto «kviro» havas pli da utileco ol «GLAT». Tamen «kviro» estas el la angla vorto "queer" («stranga»), kiu estis fivorto kaj insulto. La vorto "queer" nun rekaptiĝas, sed multe da homoj (plejparte maljunaj) ne ŝatas tiun vorton, tial la plejparto de kviraj organizoj ne nomas sin mem per tiu vorto (tiel inkluzivas la homojn kiu ne ŝatas tiun vorton). Tamen mi ne pensas ke uzo de «kviro» havas tiun historion en Esperanto, tial mi proponas la uzon de «kviro» anstataŭ «GLAT». Ekzistas multe da fivortoj kontraŭ la kvirujo, simple ne uzu vorton, se oni petas al vi ĉesi!

**Samseksemulinoj**

La L el «GLAT» signifas «lesbanoj»-n, La vorto por lesbano estas intence unua en la angla akronimo ĉar ofte la malkvirujo forgesas pri lesbanoj. Sed... Kion ĉi tiuj vortoj (kiel lesbanoj) eĉ signifas? Lesbano signifas anon el la greka insulo de Lesbo,[5] tiel ne vere signifas la anglan vorton "lesbian". La vorto estas pro Sapfo, kiu estis antikva greka poeto el la insulo, kiu verkis poemojn pri amo inter virinoj. Ekz: «Mi ne povas teksi. Maldika Afrodito venkis min per sopiro por virino.»[6] Evidente «lesbano» ne taŭgas.

**Samseksemuliĉoj**

La G el «GLAT» signifas «gejoj»-n, kiu simple signifas samseksemulon (kaj samseksemulinojn kaj samseksemuliĉojn).[7] Tiel la akronimo ne bezonas apartajn vortojn. Ankaŭ... se vi ne konsentas pri la uzo de «-iĉ»... estas ege malfacile paroli pri ĉi tiaj aferoj sen neŭtreco. Eble ni devus simple uzi vortojn kiel inemulinon (samseksemulinon) kaj iĉemuliĉon (samseksemuliĉon).

**Ĉiuseksemuloj**

La A el «GLAT» signifas «ambaŭseksemuloj»-n. La vorto «ambaŭ» estas nur por du aĵoj.[8] Tiel «ambaŭseksemulo» implicas, ke nur du seksoj ekzistas.[9] Neduumuloj ekzistas. La angla havas vorton por «ambaŭseksema» "bisexual" kaj ankaŭ por «ĉiuseksema» "pansexual", kiu validus neduumaj identecoj. Tamen por kelkaj homoj "pansexual" en la angla havas pli grandan diferencon ol la kvanto de seksemoj.

**Senseksemuloj**

Ulo, kiu havas mankon de seksemo al iu ajn ("asexual"). Kelkaj senseksemuloj, ankoraŭ volas amrilaton, kaj aliaj ne eĉ volas amrilaton ("aromantic").

**Interseksuloj**
Kelkaj beboj naskiĝas kaj ne klare apartenas al la seksa duumeco. Ekz homo kun "Klinefelter"-a sindromo kutime havas du iksajn kromosomojn kaj unu ipsilonan kromosomon.[10] Ekzistas ĉirkaŭ la sama kvanto de homoj kun intersekseco kiel homoj, kiuj havas ruĝajn harojn. En pasinteco kuracistoj sennecese faris kirurgion en la beboj.

**Transuloj**
La T el «GLAT» signifas «transuloj»-n. Transulo estas ulo, al kiu misatribuis la sekson dum naskiĝo. Ne estas ulo, kiu loĝas transe.[11] Ekz se dum naskiĝo kuracisto deklaris la sekson de la bebo «viriĉo» pro la seksorgano, kaj poste la bebo kreskas kaj redeklaras sian sekson kiel «virino», tiu homo estas transa virino. La malo de la prepozicio «trans» estas «cis» el latino, tiel oni eble legas pri «cisuloj» (maltransuloj). Onia seksemeco sendependas de sia sekso. Tiel seksa orientiĝo kaj seksa identeco ne dependas unu de la alia. Transulo povas esti aliaseksema, samseksema, ktp.

**Neduumulo**
Neduumeco estas "nonbinary", neduumulo havas identecon, kiu ne tute apartenas al la du tradiciaj seksoj.[12] En la neduumujo ekzistas multe da identecoj, ekz sensekseco, aŭ ĉiusekseco. Aŭ eble neduumulo estas nek virino nek viriĉo, sed preferas unu sekson (aŭ la pronomoj) anstataŭ la alian. Ĉar societo ne atribuas al beboj neduumecon, neduumulo apartenas al transujo.

**Sekso kaj Genro**
En la angla ekzistas du vortoj: "sex" signifas la biologian koncepton de sekso. "gender" signifas la socia koncepto de sekso. Plejofte oni dirus ke la Esperanta vorto «sekso» inkluzivas kaj "sex" kaj "gender".[13] Kelkaj homoj dirus, ke la esperanta vorto «genro» funkcius kiel "gender". Sed aliaj dirus ke ĉi tiu estas falsa amiko, kaj «genro» signifas kaj la gramatikan kategorion kaj "genius" (pri tipo, specio). La vortaroj PIV[14] kaj ReVo[15] malkonsentas unu kun la alia. Tial du esperantaj vortoj ekzistas, «transgenra» kaj «transseksa». En la angla "transsexual" implicas, ke sekso estas seksemeco, kaj ankaŭ implicas, ke transeco estas nur pri seksorganoj kaj kirurgioj. Tial en la angla, "transgender" estas preferita super "transsexual" (kiu estas la malnova vorto). Tamen eble «transsekseco» ne havas la samajn implicojn en Esperanto.

Citaĵoj

1. Neŭtrala PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020),https://vortaro.net/#ne%C5%ADtrala_kdd
2. Neŭtra PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#ne%C5%ADtra_kd
3. Ŝranko ReVo (Reta Vortaro),
http://www.kono.be/cgi-bin/vivo/ViVo.cgi?pagxo=sxrank.#sxrank.el0igxi
4. Kviro ReVo (Reta Vortaro), http://www.kono.be/cgi-bin/vivo/ViVo.cgi?pagxo=kvir.#kvir.0o
5. Lesbano PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#Lesbano_d
6. Sapfa citaĵo "Sweet mother, I cannot weave. Slender Aphrodite has overcome me with longing for a girl."https://www.goodreads.com/quotes/9079405-sweet-mother-i-cannot-weave-slender-aphrodite-has- overcome
7. Gejo PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#geja_d
8. Ambaŭ PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#amba%C5%AD_kd
9. Ambaŭseksema PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020),
https://vortaro.net/#amba%C5%ADseksema_kdd
10. Sindromo de Klinefelter Vikipedio, https://eo.wikipedia.org/wiki/Sindromo_de_Klinefelter
11. Transulo PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020),
https://vortaro.net/#transulo_kd
12. Neduumulo ReVo (Reta Vortaro),
http://www.kono.be/cgi-bin/vivo/ViVo.cgi?pagxo=du.#du.ne0umulo
13. Sekso PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#sekso_kd
14. Genro PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#genro_kd
15. Genro ReVo (Reta Vortaro), http://www.kono.be/cgi-bin/vivo/ViVo.cgi?pagxo=genr.#genr.0o

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00 (post la epidemio)
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Jonathan Cooper |
| Estrarano: | Alan Turvey, Adam Levy |